FN PER ANC 47

# ESPERANTO NORMANDA BULTENO

.unuiĝo de la normandaj esperantistoj
TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL.
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE :

n°171

MAJO 1991A - ( PRINTEMPO 1991A - N° 86A NOVA SERIO )

*Minimuma Kotizo por 1990 : 45 frankoj. CCP 283 40 H ROUEN*
*Sendu vian postĉekon rekte al via CCP Centro.*
*bankĉekon al Pierre Quillaud*
*16, rue Lt Vaisseau Paris 76 120 Le Grand-Quevilly*

*Redaktas : Yves Nicolas 17-37 Quartier du Bois*
*14 200 Hérouville St Clair. Tel. 31 95 11 81*

## NI LEGU

*KARAJ LEGANTOJ*

*En la lasta numero de la revuo "AUTREMENT" pri "LA BALTAJ LANDOJ", oni raportas ke en Francio oni preskaŭ nenion scias pri estona verkisto, Arvo VALTON, de kiu nur unu novelo estis francen tradukita.*

*Krom Estonoj kaj Baltoj, kiuj jam aŭdis pri tiu elstara verkisto, en sia lando rigardata kiel moderniganto de la verkarto ?*

*Tamen, tiu novelo estas legebla en la tuta mondo...pere de la esperantaj libro-servoj, ĉar ĝi enestas novelaron tradukitan esperanten sub la titolo "EN FREMDA URBO". Tre leginda libro kiun mi konsilas al vi.*

*Pluraj baltaj titoloj ekzistas en esperanto, tre certe multe pli ol povas prezenti la francaj eldonistoj. Litovo, amiko mia, nun estas tradukanta "FEBRO"n de Istvan NEMERE, de esperanto al la litova lingvo. Ankaŭ tiusence esperanto valoras.*

*Vere nia internacia lingvo, ofte mokata, sen- aŭ misargumente kritikata, estas malfermita fenestro al la tutmonda kulturo. La esperantistoj mem ne ĉiam konscias pri la amplekso de la libroj, aŭ revuoj, nun aĉeteblaj. Tuj bonvolu trafoliumi la diversajn katalogojn por konstati ke vivo de esperantisto ne sufiĉus por ĉion legi ! Bildstrioj, polic-romanoj, eseoj, sciencoraportoj, poemoj, kanzonoj, kaj kuir-receptoj, erotikaĵoj, la Nobla Korano aŭ la Nova Testamento...ĉia ĉio, ĉiel, ĉie, ĉial, en esperanto !!!*



*Ju pli ni aĉetos kaj legos, despli ni kontribuos al disvolviĝo de esperanto, kaj, ankoraŭ pli grave , de tiu tutmonda kulturo.*

# KIU EMAS KORESPONDI ?



*Barbara CVETKOVA, kiu vizitis Normandion antaŭ unu jaro, sendis al ni liston da Leningradaj korespondemaj gelernantoj. Elecktu unu el ĉi-suba listo, kaj bone korespondu !*

1) *Valerij KOLESNIKOV (23 j.)*
*Severnij pr., 6, 1 276*
*194 354 LENINGRAD*

2) *Lilia SERGEEVA (49 j.)*
*inĝeniero (hobio : turismo)*
*Pr. Gaza, 21 183*
*198020 LENINGRAD*



3) *Vjaĉeslav SEMENOV (30 j.)*
*miliĉano-ekonomisto (hobio: historio, sporto)*
*Ul. M. Balkanskaja, 30/3-189*
*192283 LENINGRAD*

4) *Nikolao SMOLENKIN (35 j.)*
*esploristo-juristo (hobio : kolekto de moneroj )*
*Ul; Kollantaj 21 1 443*
*193 313 LENINGRAD*



5) *Oleg CIGANKOV (29 j.)*
*programisto (hobio : speleologio biciklado )*
*Zelenaja ul. 1 20*
*p. Bubri, Leningrad obl.*
*SU 188660*

6) *Jurij NALLIVAJKO 30 j.)*
*studento en fervoja instituto, filatelisto*
*Ul. Tovarnaja Baltijskaja 2-4*
*188 350 GATCINA*

*(sur la koverto, indiku : URSS)*

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

# FINANCOJ KATENAS NIN ...

Jen ĉi-sube listo de kotizoj ricevitaj inter Decembro 1990 kaj fino de Marto 1991 :

Gesinjoroj : Lemarchand, Pottier, Saunier, Chevallier, Bessière, Legret, Houlard, Jourdaine, Cétaire, Caron, Chalm, Corenwinder, Gibaux, Huet, Larchevêque, Mary, Nardin, Noel, Peltier, Séry J., Séry S., Loisel, Lemazurier, Charron, Legros, Quillaud, Lebrun, Poulain, Alleno, Blaise, Longuet, Martin, Maurice, Quillet, Rocques, Robiolle, Bataille, Defrance, Duflo, Millet, Colombel, Lefebvre Belateche, Dubois, Mortreuil, Bony, Benoit, Pascal, Deuff.




Kelkaj ne ankoraŭ pagis sian 1990an kotizon, ili ne atendu pli pli longe, kaj ankaŭ pagu la 1991an kotizon samtempe.

Petro Kijo



*NORMANDOJ !!!*

*Tiu bulteno devus esti ok paĝa, ne alvenis tekstoj kaj novaĵoj de la grupoj (krom anonco de Yvetot). La redaktanto de nia regiona bulteno estas nur papago tajpanta tion kion al li vi skribas ! Sendu viajn kontribuojn por la 15a de JUNIO. Dankon*

# LATVIO



*Ŝoforo en kolkozo apud Riga, Zigrids POLAKS vojaĝis dum unu monato en Francio, pere de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) kiu organizis gastigadon en dudeko da urboj. La 28an de Januaro, en Hérouville, li respondis al demandoj dum publika kunveno. Jen kelkaj el tiuj respondoj :*

*Kiel vi travivis la lastajn eventojn en Riga ?*

*Post la eventoj de Vilnius, 15 viktimoj, multaj Latvoj kontaktis la Popolan Fronton de Latvio. Ili spontanee iris al la ĉefaj punktoj de Riga. Mi mem estis antaŭ la Televiza Turo kun 10 000 aliaj personoj, same amasiĝis homoj antaŭ la Parlamentejo, la Telefoncentro, kaj diversaj ministeriaj instancoj Dum 4 noktoj... kaj la morgaŭon al la labor' ! Miaj edzino kaj infanoj ploris ĉiufoje kiam mi forlasis ilin, sed ĉiuj najbaroj jam urben estis irantaj, kia honto estus por mi ne iri ! Vi ne povas imagi kiel homoj estis sinceraj kaj solidaremaj dum tiuj noktoj. Maljunuloj kiuj ne povis surstrate deĵori, tamen helpis proponante manĝaĵojn, trinkaĵojn, eĉ tranoktadon, ĉar ne nur de Riga, sed de la tuta lando alvenis la manifestaciantoj. Nur niajn manojn ni havis kontraŭ tankoj, sed ĉiuj, junaj aŭ ne, estis pretaj oferi sian vivon por libereco de niaj infanoj.*

*Kiun lingvon vi uzas por rilati kun la Rusoj ?*


*Bedaŭrinde, ne esperanton ! Mia filo, 11 jara, perfekte scipovas la rusan. Ne eblas fari alimaniere, 70 % de la loĝantoj en Riga ne estas Latvoj. Multaj edziĝoj okazas kun Baltoj, kaj Rusoj. Eble 30 %.*

*Kion vi opinias pri la referendumo kiun organizos Gorbatĉev, la 17an de Marto, pri la rilatoj inter la Respublikoj kaj la Centro (Kremlino) ?*

*Mi foriris de Latvio tuj post kiam Gorbatĉev anoncis ĝin, pro tio la enhavon mi ne konas. Sed kion ĝi povas signifi dum la tankoj staras sur niaj stratoj ? Sovetoj alproprigis Latvion sen referendumo. Tamen, bone organizata, tutcerte ni venkus car multaj Rusoj en Latvio ne estas komunistoj. La du trionoj de la Parlamentanoj estas membroj, aŭ simile, de la Popola Fronto, kvankam 48 % de la loĝantoj ne estas Latvoj.*

*Ĉu la Latvoj povas facile vojaĝi eksterlanden ?*

*Nun jes, kondiĉe ke ili ricevu invitilon de eksterlandano. Por tiu vojaĝo min invitis UFE. Mi nur pagis la trajnon : iron kaj revenon Riga - Parizo, 600 rublojn (monata gajno 220 rubloj). Restado en Francio pagas la kluboj kiuj min gastigas. Cetere, neniun eksterlandan valuton mi posedas, pro malpermeso tiusence en Sovetunio.*



# ESPERANTO

HAVRA ESPERANTISTA GRUPO - GROUPE ESPERANTISTE DU HAVRE

# LA

# ĜENERALA ASEMBLEO

BONVOLU NOTI !!!

Havro invitas la samideanajn normandanojn partopreni amikan semajnfinon dum la 12a kaj 13a de Oktobro 1991.

**PROGRAMO ! PROGRAMO !**

En Sabato 12a de Oktobro :

16 H 00 Akcepto de la partoprenantoj
17 H 00 Piediranta malkovro de la urbo
19 H 00 Komuna vespermanĝo
20 H 30 Vesperaĵo kun kanzonisto
Lumbildaro pri Universala Kongreso

En Dimanco 13a de Oktobro :

9 H 30 Ĝenerala Asembleo de U. N. E., alparolo de la Prezidanto, morala kaj financa raportoj, elektoj de la Komitato, agadraportoj de la Grupoj, bulteno.
12 H 30 Komuna tagmango
14 H 00 Posttagmeza programero difinota.



NI VIN ATENDAS NI VIN ATENDAS NI VIN ATENDAS NI VIN ATENDAS

LA 76-A UNIVERSALA KONGRESO

en Bergeno (Norvegio) de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1991. Aliĝkotizo tra UFE (en FF)

Sidejo de UFE: 4bis rue de la Cerisaie. 75004 Paris

| | antaŭ la 90.12.31 | antaŭ la 91.03.31 | post la 91.04.01 |
|---|---|---|---|
| individua membro de UEA (ne MG) | 550 | 685 | 824 |
| ne-individua membro de UEA | 685 | 824 | 960 |
| kunulo/junulo/handikapulo mem individua membro | 275 | 412 | 550 |
| kunulo/junulo/handikapulo ne individua membro | 412 | 550 | 685 |

Junulo estas tiu, kiu je la dato 91.01.01 estis pli ol 19 kaj malpli ol 30-jara. Oni nepre notu en tiu kazo la naskiĝdaton sur la aliĝilo.